

## Antaŭ ol la Tempo Estis

En la Hungarlingva ĉefverko de Imre Madach, La Tragedio de la Homo, estas supozita konversacio inter Dio kaj Satano antaŭ ol la tempo de nia tergloba komenciĝis. Parto de ilia dialogo jenas:

La Sinjoro - Mi jam projektis de eternaj temploj, jam en mi vivis, kio nun eventis.

Lucifero - Malplenon inter pensoj vi ne sentis? Por ĉia esto tio estis bar' kaj vin devigis por la krea far'.

Jen, estis Lucifer' la barikado, mi, praspirit' eterna de l' neado.

Vi venkis min, ĉar estas ja fatal', ke me senĉese falu en batal', sed mi relevu min kun nova forta.

Vi naskis materion (t.e. Lucifero mem), do mi spacon akiris! Apud vivo staras morto, feliĉ' posthavas senreviĝ-agacon, la lumo ombron; fido malesperon.

Jen do, mi ĉie staras, kie vi! Tiel konante, ĉu mi vin adoru?

La Sinjoro - Ha vi, spirit' ribela, for de mi! Mi povus vin frakasi, - mi ne faros.

El ĉia spiritligo ekzilate, el ŝlako luktu fremde, malamate. Kaj en doloro de la aŭstera solo, senĉesa pens' vin puŝu en ĉagrenon, ke vane vi skuadas vian ĉenon, batali vanas kontraŭ la Sinjoro.

(La Tradegio de l'Homo, Imre Madach, Corvina Budapest)

El ĉi tiu dialogo ni povas ĉerpi kelkajn informojn pri nia antaŭtera ekzisto. Unue, estis antaŭtera ekzisto kaj Dio ekzistas. Due, Lucifero aŭ Satano ekzistas. Trie, estis baraktado en la ĉieloj post kiu, Lucifero estis forĵetita. Kvankam en sia verko de Madach tendencas substreki la negativajn aspektojn de la homa ekzisto, tamen, li bone kaptas la esencon inter la baraktado inter bono kaj malbono. Por komplete kompreni ĉi tiujn aferojn, oni komprenu la planon de Dio por nia savo. Sur la sekvantaj paĝoj, vi informiĝos pri la samaj temoj pritraktitaj en la Esperanto-versio de la hungara ĉefverko, sed laŭ la lumo de la Sanktaj Skriboj.

Ekzistas Dio

Alma, profeto de la Libro de Mormon, skribis: "La skriboj estas malfermitaj antaŭ vi, jes, kaj ĉio indikas, ke ekzistas Dio; ja, eĉ la tero, kaj ĉiuj aĵoj, kiuj estas sur ĝia surfaco, ja, ĝia moviĝo, ja, kaj ankaŭ ĉiuj planedoj, kiuj moviĝas en sia regula formo atestas, ke ekzistas Supera Kreinto." (Alma 30:44). Vi povas rigardi al dumnoktan ĉielon kaj ekhavi ideon pri tio, kion Alma volis diri. Estas milionoj da steloj kaj planedoj, ĉiuj en perfekta ordo. Ili ne estas tie per simpla hazardo. Ni povas vidi la verkojn de Dio kaj en la ĉielo kaj sur la tero. La granda varieco de belaj plantoj, bestoj, montoj, riveroj kaj nuboj, kiuj donas al ni pluvon kaj neĝon: ĉiuj atestas ke ekzistas Dio.

Dio estas la Reganto de la Ĉielo kaj de la Tero

La profetoj instruis al ni, ke Dio estas la reganto ĉiupotenca de la universo. Dio loĝas en la ĉielo (Doktrino kaj Interligoj (DI) 20:17). Per sia filo Jesuo Kristo, Li kreis la ĉielon kaj la teron kaj ĉiujn aĵojn, kiuj en ĝi estas. "Kaj okazis, ke la Eternulo parolis al Moseo, dirante: Jen mi rivelas al vi ĉi tiu ĉielo, kaj ĉi tiu tero; skribu la vortojn, kiujn mi parolas. Mi estas la Komenco kaj la Fino, Dio Plejpotenca; per mia Solenaskito mi kreis ĉi tiujn aĵojn; jes, en la komenco mi kreis la ĉielon, kaj la teron sur kiu vi staras." (Moseo 2:1). Li kreis la lunon, la stelojn kaj la sunon. Li organizis ĉi tiun mondon kaj donis al ĝi ĝian formon, movon kaj vivon. Li metis vivajn estaĵojn en la aeron kaj la akvon. Li kovris la montetojn kaj ebenaĵojn per ĉiuspecaj bestoj. Li donis al ni la tagon kaj la nokton; la someron kaj la vintron; la sezonon de plantado kaj la sezonon de rikolto. Li faris la homon laŭ sia propra bildo por regi super siaj propraj kreitaĵoj. (Vidu Genezon 1:26-27).

"Kredu je Dio; kredu ke li ekzistas, kaj ke li kreis ĉion, kaj en la ĉielo kaj sur la tero; kredu, ke li havas ĉian saĝon, kaj ĉian povon, kaj en la ĉielo kaj sur la tero; kredu, ke la homo ne komprenas ĉion, kion la Sinjoro povas kompreni." (Mosiah 4:9).

Dio estas la sola supera kaj absoluta estaĵo en kiu ni kredas kaj al kiu ni adoras. Li estas la Kreanto, la Reganto kaj Prizorganto de ĉiuj aĵoj.

Kia estaĵo estas Dio?

La profeto Jozefo Smith diris, "Se la vualo malfermiĝus hodiaŭ, kaj la Granda Dio, kiu konservas ĉi tiun mondon en ĝia orbito kaj subtenas ĉiujn mondojn kaj ĉiujn aĵojn per sia povo, mem manifestiĝus, mi diras, ke se vi lin vidus hodiaŭ, vi lin vidus en la formo de homo." Dio estas homo perfekta kaj ekzaltita, estaĵo de karno kaj ostoj, kaj ene de lia tuŝebla korpo estas eterna spirito.

Dio estas perfekta. Li estas Dio de amo, graco, kompatemo, vero, potenco, fido, kono kaj juĝo. Li havas ĉian povon, konas ĉion kaj estas plena de boneco. Ĉio, kio estas bona venas de Dio. Ĉio, kion Li faras havas la celon helpi liajn infanojn fariĝi kiel Li, Dio. Li diris: "Ĉar jen, ĉi tio estas mia laboro kaj mia gloro -- efektiviĝi la senmortecon kaj eternan vivon de la homo." (Moseo 1:39).

Aldonaj citaĵoj

"Tamen, ili faris la pli grandan stelon; kiel, plie, se estas du spiritoj, kaj unu estas pli inteligenta ol la alia, tamen ĉi tiuj du spiritoj, eĉ se unu estas pli inteligenta ol la alia, havas neniun komencon; ili ekzistis antaŭe, ili havos neniun finon, ili ekzistos poste, ĉar ili estas gnolaum, aŭ eternaj.

Kaj la Eternulo diris al mi: Ja ekzistas tiuj du faktoj, ke estas du spiritoj, el kiuj unu estas pli inteligenta ol la alia; alia estos pli inteligenta ol ili; mi estas la Eternulo, via Dio, mi estas pli inteligenta ol ĉiuj el ili." (Abraham 3:18-19).

"Ĉar ĉu ni ne legas, ke Dio estas sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj por ĉiam, kaj ĉe li ne povas ekzisti ŝanĝo, nek ombro de ŝanĝado?" (Mormon 9:9).

"Ho la grandeco kaj la justeco de nia Dio! Ĉar li plenumas ĉiujn siajn vortojn, kaj ili eliris el lia buŝo, kaj lia leĝo devos esti plenumata." (2 Nifai 9:17).

Kial ni devas strebi koni Dion?

Ni scias, ke Dio estas tiel grava, ke la Savinto diris: "Kaj jen estas la eterna vivo, ke ili konu Vin, la sole veran Dion, kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuo Kristo." (Johano 17:3).

Kiel mi povas koni Dion?

Ni povas koni kaj kompreni Dion per la jeno; Kredi je Li. Kredi, ke Li ekzistas kaj ke Li nin amas. Studi la Sanktajn Skribojn. Preĝi al Li. Obei la ordonojn. Se ni faras ĉi tion, ni konos Dion kaj ni finfine ricevos eternan vivon.

Ni Ĉiela Familio

Ni estas infanoj de nia Ĉiela Patro. Dio ne estas nur reganto kaj kreanto. Li estas ankaŭ nia Ĉiela Patro. Ĉiuj viroj kaj virinoj estas senmetafore filoj kaj filinoj de la dieco... la homo en sia spirita stato estis generita kaj naskita de ĉielaj gepatroj kaj kreskis en la eternaj domoj de la Patro antaŭ ol veni al la tero kun fizika korpo.

Ĉiu persono, kiu naskiĝas surtere estas nia ĉiela frato aŭ ĉiela fratino. La unua spirito, kiu estis naskita de niaj ĉielaj gepatroj, estis Jesuo Kristo (DI 93:21). Tial, Li estas nia Plejaĝa Frato. Nia spirito similas al niaj ĉielaj gepatroj eĉ se ili havas releviĝintajn korpojn. Ni heredas la potencon disvolvi la diecajn atributojn, kiujn ili posedas. Se ni agas senerare ni fariĝos perfektaj estaĵoj, kiel ili estas.

Ni disvolvis niajn personecojn kaj talentojn dum ni vivis en la ĉielo

La Sanktaj Skriboj instruas al ni, ke ĉiuj niaj profetoj pretiĝis, dum ili estis ankoraŭ ĉielaj spiritoj, por estiĝi spiritaj estroj surtere. Dio ilin antaŭordinis (elektis) esti gvidantoj de siaj infanoj sur la tero antaŭ ol ili havis mortemajn korpojn. Jesuo Kristo, Adamo kaj Abrahamo estas kelkaj el tiuj elektitaj gvidantoj. "La Eternulo jam montris al mi, Abraham, la inteligentajn, kiuj estis organizitaj antaŭ ol la mondo ekzistis; kaj inter ĉiuj ĉi troviĝis multaj noblaj kaj grandaj; Kaj Dio vidis ĉi tiujn animojn, kaj vidis, ke ili estas bonaj, kaj li staris meze de ili, kaj li diris: Ĉi tiujn mi faros miaj registroj; ĉar li staris inter tiuj, kiuj estis spiritoj, kaj li vidis, ke ili estas bonaj; kaj li diris al mi: Abraham, vi estas unu el ili, vi estis elektita antaŭ ol vi naskiĝis." (Abraham 3:22-23). Jozefo Smith instruis, ke ĉiuj, kiuj estas alvokitaj estri en la Eklezio, estis antaŭordinitaj por tiu ĉi celo. Tamen, surtere, ĉiu homo estas libera akcepti aŭ malakcepti sian alvokon.

Ni ĉiuj estis egalaj en la ĉielo; ni havis malsamajn talentojn kaj kapablecojn kaj ni estis alvokitaj al malsamaj laboroj kaj oficoj sur la tero. Ni povas lerni pli pri niaj talentoj kaj alvoko kiam ni ricevas nian Patriarkan Benon. Nia Ĉiela Patro memoras pri tio kiuj ni estis antaŭ niaj naskiĝoj. Li elektis la tempon kaj la lokon por ke ĉiuj ni povu naskiĝi tiel, ke ni kapablu lerni la lecionojn, kiujn ni unuope bezonos. Tial ni povas disvolvi niajn diversajn talentojn kaj personecojn. Tamen, li ne igas al ni fari ion ajn. Ni devas lerni obei Lin liberavole aŭ ni perdos la ŝancon fariĝi kiel Li.

Niaj Ĉielaj Gepatroj deziras doni sian ĝojon al ni

Niaj ĉielaj gepatroj donis al ni ĉielan hejmon multe pli gloran kaj belan ol povas esti iu ajn loko surtera kaj ni estis feliĉaj tie; sed ili sciis ke ne eblus nia progreso post difinita punkto se ni ne disvolvus ĉiun diecan kvaliton, kun ili posedas. Por ke ĉi tio estu farebla, ni bezonis forlasi nian ĉielan hejmon por esti elprovitaj kaj gajni spertojn. Estis necese elekti aŭ preferi bonon anstataŭ malbonon. Nia spirito bezonis esti vestita per fizika korpo, morti kaj esti denove unuigita kun la korpo per la releviĝo; estas tiam, kiam ni ricevos senmortan korpon similan al tiuj de niaj ĉielaj gepatroj. Se ni sukcesas je ĉiuj elprovoj, ni povos ricevi la plenecon de ĝojo, kiun cia Ĉiela Patro ricevis. (DI 93:33).

Nia Ĉiela Patro prezentis al ni planon por fariĝi similaj al Li

Vidante, ke ni ne povis progresi pli en la ĉielo, ni Ĉielan Patron alvokis la "Grandan Kunsidon", kiu celis prezenti al ni planon por nia progreso. Ni lernis, ke se ni sekvas la planon, ni povos fariĝi similaj al Li; ni havos la ĉielajn korpojn kaj ĉian povon en la ĉielo kaj sur la tero. Ni estos similaj al niaj Ĉielaj Gepatroj kaj ni naskos spiritajn infanojn kiel ili.

Ili diris al ni, ke estos preparita mondo, kie ni estos elprovitaj. "Kaj tie staris inter ili iu, kiu similis al Dio, kaj li diris al tiuj, kiuj estis kun li: Ni malsupreniros, ĉar estas spaco tie, kaj ni prenos el ĉi tiuj materialoj, kaj ni faros teron, sur kiu ili povos loĝi.

Kaj ni provos ilin ĉi-maniere por konstati, ĉu ili faros ĉion, kion la Eternulo, ilia Dio, ordonos al ili;

Kaj tiuj, kiuj konservas sian unuan regadon, ricevos aldonon; kaj tiuj, kiuj ne konservas sian unuan regadon, ne havos gloron en la sama regno kun tiuj, kiuj konservas sian unuan regadon; kaj tiuj, kiuj konservas sian duan regadon, ricevos aldonon de gloro sur siaj kapoj por ĉiam kaj eterne." (Abraham 3:24-26).

Vualo kovros nian memoron kaj ni forgesos ĉion pri nia ĉiela hejmo. Ĉi tio estos necesa por ke ni kapablu elekti inter bono kaj malbono per nia natura inklino por unu aŭ la alia; memoraĵo pri nia vivo kun nia Ĉiela Patro neniel influas nin kaj ni povos obei Lin per nia fido je Li, kaj ne pro nia kono aŭ memoro. Li helpos al ni rekoni la veron kiam ni ĝin denove aŭdos sur la tero. (DI 132:19-20).

En la Granda Kunsido oni klarigis al ni pri nia progreso. Ni lernis, ke ni povas havi plenecon de ĝojo. Tamen, ni ankaŭ lernis, ke ne ĉiuj infanoj de nia Ĉiela Patro volos ricevi ĉi tiun plenecon de ĝojo. Iuj el ni estos trompitaĵ; elektos aliajn vojojn kaj perdiĝos. Ni lernis, ke ĉiuj havos elprovojn dum la tera vivo. Ĉu malsanoj, aŭ malsukcesoj, ĉu doloroj, ĉu suferoj, ĉu la morto; sed ankaŭ ni lernis, ke la elpruvoj estos por nia plibonigo kaj por riĉigi nian spertotrezoron. Ni lernis, ke la elpruvoj nin purigos anstataŭ nin frustros. Per ili ni ellernos eltenon, paciencon, kompaton kaj veran amon. En la Kunsido, ni ankaŭ lernis, ke pro nia malforteco ankaŭ ni pekos; ke nia Savonto donos sian vivon por ni por ke ni venku niajn pekojn kaj la morton per la releviĝo, kaj se ni obeos lian vorton kaj sekvos lian ekzemplon, ni estos ekzaltitaj kaj ni fariĝos kiel niaj ĉielaj gepatroj kaj ni ricevos plenan ĝojon.

Jesuo Kristo, nia Gvidanto kaj Elektita Savonto

Kiam al ni estis prezentita la plano de savo en la antaŭtera vivo, ni estis tiom feliĉaj, ke ni kriis pro ĝojo.

Ni bezonis Gvidanton kaj Savonton

Ni komprenis, ke ni devos forlasi nian ĉielan hejmon dum mallonga tempo, kaj ke ni ne loĝos plu kun niaj ĉielaj gepatroj. Dum la tempo, kiun ni pasigos malproksime de ili, ni ĉiuj pekos kaj iuj perdiĝos survoje. Nia Ĉiela Patro tion sciis kaj nin amis ĉiujn tiom, ke Li establis manieron por helpi nin.

Ni bezonas Savonton, kiu pagos la prezon de niaj pekoj kaj kiu instruos al ni kiel reiri al nia Ĉiela Patro. Du el niaj fratoj proponis helpon; nia pliaĝa frato Jesuo Kristo, kiu tiam nomiĝis Jehovo, kaj Lucifero. "Kaj la Eternulo diris: Kiun mi sendu? Kaj iu simila al la Filo de Homo respondis: Jen mi, sendu min. Kaj alia respondis kaj diris: Jen mi sendu min. Kaj la Eternulo diris: Mi sendos la unua." (Abraham 3:27).

Jesuo Kristo volonte venis al la tero por doni sian vivon por ni kaj alpreni sur sin niajn pekojn. Kaj li kaj nia Ĉiela Patro volis, ke ni observu la ordonojn, sed ili sciis, ke ni devos havi la liberecon elekti por ke ni estu elpruvitaj taŭgaj por ricevi la ekzalton. "Kaj mi, la Eternulo, parolis al Moseo, dirante: Tiu Satano, al kiu vi ordonis en la nomo de mia Solenaskito, estas tiu, kiu estis de la komenco, kaj li venis antaŭ min, dirante: Jen ĉi tie mi; sendu min; mi estos via filo, kaj mi savos la tutan homaron, tiel ke ne unu animo estos perdita, kaj mi certe faros tion; pro tio donu al mi vian gloron.

Sed, jen, mia Filo, la Amata, kiu estis mi Amato kaj Elektito de komenco, diris al mi: Patro, plenumiĝu via volo, kaj la gloro estu via por eterne." (Moseo 4:1-2).

Satano deziris devigi nin fari lian volon laŭ la plano, kiu ne permesos al ni fari elektojn. Ĝi forprenus de ni nian liberecon elekti tion, kion diris al ni nia Ĉiela Patro. Li deziris havi la tutan gloron pro nia savo kaj volis esti nia dio.

## Jesuo Kristo fariĝis nia Gvidanto kaj Savonto

Aŭskultinte siajn du filojn, nia Ĉiela Patro diris: "Mi sendos la unuan." Jesuo Kristo estis elektita kaj ordinita esti nia Savinto. Multe da versoj de la Sanktaj Skriboj parolas pri tio. Unu el tiuj rakontas, kiel Jesuo Kristo diris al la Frato de Jared, profeto de la Libro de Mormon: "Jen, Mi estas li, kiu estis preparita antaŭ la fondiĝo de la mondo por elaçeti mian popolon. Jen, mi estas Jesuo Kristo. Mi estas la Patro kaj la Filo. En mi la tuta homaro havos lumon, kaj tio eterne, eĉ tiuj, kiuj kredas je mia nomo; kaj kiuj fariĝos miaj filoj kaj filinoj." (Ether 3:14). Kiam Kristo vivis sur la teron, li diris al siaj sekvantoj: "Ĉar mi malsupreniris de la ĉielo, por plenumi ne mian volon, sed la volon de Tiu, kiu min sendis, ke el ĉio, kion Li donis as mi, mi ne perdu ion, sed relevu ĝin en la lasta tago. Ĉar estas la volo de mia Patro, ke ĉiu, kiu vidas la Filon, kaj kredas al li, havu eternan vivon; kaj me levos tiun en la lasta tago." (Johano 6:38-40).

## La milito de la ĉieloj

Ĉar nia Ĉiela Patro elektis Jesuon Kriston por esti nia Savonto, Satano koleriĝis kaj ribelis. Tiam ekestis granda batalo en la ĉieloj; Satano kaj liaj sekvantoj militas kontraŭ Kristo kaj liaj sekvantoj. Pro ĉi tiu ribelo, Satano kaj ĉiuj spiritoj, kiuj lin sekvis, estis forĵetitaj el antaŭ Dio. La triona parto de la spiritoj, kiuj loĝis en la ĉieloj, estis tiel forpelitaj. Satan kaj ĉiuj tiuj, kiuj lin sekvis, estis punataj per tio, ke ili ne rajtas ricevi fizikajn korpojn. Ni estas sur la tero kaj ni havas fizikajn korpojn el karno kaj ostoj. Pro tio, ni scias, ke ni elektis sekvi Jesuon Kriston kaj nian Ĉielan Patron. Satano kaj liaj sekvantoj ankaŭ estas surtere, sed kiel spiritoj. Ili ne forgesas, kiuj ni estas, kaj ke ni batalis kontraŭ ili. Ili estas ĉirkaŭ ni ĉiutage tentantaj nin kaj puŝantaj nin fari malbonaĵojn, kiuj malplaĉas al nia Ĉiela Patro. En nia antaŭtera vivo, ni elektis agi ĝuste kaj ni devas daŭre tiel agi sur la tero. Nur per la sekvado al Jesuo ni povos reiri al nia ĉiela hejmo.

## Ni havas la instruojn de la Savinto por nin gvidi

Ekde la komenco Jesuo revelaciis la evangelion, kiu instruas al ni pri tio, kion ni devas fari por reeniri la ĉeeston de nia Ĉiela Patro. En la ĝusta momento Li alvenis al la tero kaj instruis al ni la planon de savo kaj ekzalto per siaj vortoj kaj vivmaniero. Li fondis Sian Eklezion kaj pastrecon sur la tero. Estis li, kiu prenis niajn pekojn sur sin kaj, se ni sekvas liajn instruojn ni povos vivi denove en la ĉiela regno. Li estis elektita esti nia Savonto kiam ni ĉiuj ĉeestis la Grandan Kunsidon kun niaj ĉielaj gepatroj. Li fariĝis nia Savonto kaj li faris sian parton, kiu nin permesos reiri al nia ĉiela hejmo. Nun ĉio dependas de ni por elpruvi, ke ni estas taŭgaj ricevas la ekzaltan.

## Aldonaj citaĵoj

"Ĉar, kiel la morto venas al ĉiuj homoj, por plenumi la kompatan planon de la granda Kreinto, nepre devos esti povo de releviĝo, kaj la releviĝo nepre devos veni al la homo pro la falo: kaj la falo venis pro leĝorompo; kaj, ĉar homoj falis, ili estis detranĉitaj de antaŭ la Sinjoro. Pro tio nepre devos esti senfina elaĉeto - se la elaĉeto ne estus senfina, ĉi tiu putrema ne povus surmeti senputrecon. Pro tio, la unua juĝo, kiu venis sur la homon, nepre devis resti dum senfina daŭrado. Kaj, se jes, ĉi tiu karno devus kuŝiĝi por putri kaj polviĝi en sian patrinan teron, neniam releviĝonte.

Ho, la saĝeco de Dio, lia korfavoro kaj graco! Ĉar ja, se la karno ne releviĝus denove, niaj spiritoj devus submetiĝi al tiu anĝelo, kiu falis de antaŭ la Eterna Dio, kaj fariĝis la diablo, neniam releviĝonta.

Kaj niaj spiritoj devus fariĝi similaj al li, kaj ni devus fariĝi demonoj, anĝeloj al diablo, forsendotaj el antaŭ nia Dio, kaj restontaj kun la patro de mensogoj, en mizero, simile al li; jes, al tiu estulo, kiu trompis niajn unuajn prapatrojn, kiu transformis sin preskaŭ en anĝelon de lumo, kaj incitas la homidojn al sekretaj komplotoj de murdo kaj ĉiaj sekretaj agoj de mallumo.

Ho, kiel granda estas la boneco de nia Dio, kiu ebenigas vojon por nia saviĝo el la tenego de ĉi tiu terura monstro; jes tiu monstro, la morto kaj la infero, kiujn mi nomas la morto de la korpo, kaj ankaŭ la morto de la spirito.

Kaj pro la maniero de savo de nia Dio, la Sanktulo de Izrael, ĉi tiu morto, pri kiu mi parolis, kiu estas la portempa morto, redonos siajn mortintojn: kiu morto estas la tombo.

Kaj ĉi tiu morto, pri kiu mi parolis, kiu estas la spirita morto, redonos siajn mortintojn; kiu spirita morto estas la infero; pro kio, la morto kaj la infero devos redoni siajn mortintojn, kaj la infero devos redoni siajn kaptitajn spiritojn, kaj la tombo devos redoni siajn kaptitajn korpojn, kaj la korpoj kaj la spiritoj de la homoj estos redonitaj unu al la alia; kaj tio fariĝos per la potenco de la releviĝo de la Sanktulo de Izrael.

Ho, kiel granda estas la plano de nia Dio! Ĉar aliflanke, la paradizo de Dio devos redoni la spiritojn de la virtuloj, kaj la tombo devos redoni la korpojn de la virtuloj; kaj la spirito kaj la korpo estos redonitaj unu al la alia, kaj ĉiuj homoj fariĝos senputraj kaj senmortaj, kaj ili estos vivantaj animoj, havante perfektan scion kiel ni en la karno, krom tio, ke nia scio estos perfekta.

Pro tio, ni havos perfektan scion pri nia tuta kulpeco kaj nia malpureco kaj nia nudeco; kaj la virtuloj havos perfektan scion pri sia feliĉo kaj sia virteco, estante vestitaj per pureco, jes, nome per la mantelo do virteco.

Kaj okazos, ke ĉiuj homoj pasinte de ĉi tiu unua morto en vivon, tiel ke ili fariĝis senmortaj, devos aperi antaŭ la tribunala seĝo de la Sanktulo de Izrael; kaj poste venos la juĝo, kaj tiam

ili devos esti juĝataj laŭ la sankta juĝo de Dio.

Kaj certe, kiel la Sinjoro vivas, ĉar Dio la Sinjoro parolis tion, kaj tio estas lia eterna parolo, kiu ne povos forpasi, ke tiuj, kiuj estas virtaj, estos ankoraŭ virtaj, kaj tiuj, kiuj estas malpuraj, estos ankoraŭ malpuraj; tial tiuj, kiuj estas malpuraj, estas la diablo kaj liaj anĝeloj; kaj ili foriros en eternan fajron preparitan por ili; kaj ilia turmentado estos kiel lago fajra kaj sulfura, kies flamo leviĝos por ĉiam kaj eterne kaj ne havos finon.

Ho, la grandeco kaj la justeco de nia Dio! Ĉar li plenumas ĉiujn siajn vortojn, kaj ili eliris el lia buŝo, kaj lia leĝo devos esti plenumata.

Sed, efektive, la virtuloj, la sanktuloj de la Sanktulo de Izrael, tiuj, kiuj kredis je la Sanktulo de Izrael, tiuj, kiuj suferis la krucojn de la monto, kaj malestimis ties honton, ili heredos la regnon de Dio, kiu estis preparita por ili de post la fondiĝo de la mondo, kaj ilia ĝojo estos plena por ĉiam.

Ho, la grandeco de la kompato de nia Dio, la Sanktulo de Izrael! Ĉar li savas siajn sanktulojn de tiu terura monstro la diablo, kaj la morto, kaj la infero, kaj tiu lago fajra kaj sulfura, kiu estas senfina turmentado.

Ho, kiel granda estas la sankteco de nia Dio! Ĉar li scias ĉion, kaj ne ekzistas io, kion ne scias.

Kaj li venas en la mondon, por ke li savu ĉiujn homojn, se ili aŭskultos lian voĉon; ĉar li ja suferas la dolorojn de ĉiu homoj, jes, la dolorojn de ĉiu vivulo, kaj viroj kaj virino kaj infanoj, kiuj apartenas al la familio de Adam.

Kaj li suferas tion, por ke la releviĝo povu okazi al ĉiuj homoj, por ke ĉiuj povu stari antaŭ li en la granda tago de juĝo.

Kaj li ordonas al ĉiuj homoj, ke ili nepre pentu, kaj estu baptitaj en lia nomo, havante perfektan fidon al la Sanktulo de Izrael, aŭ ili ne povos esti savitaj en la regno de Dio.

Kaj, se ili ne pentos kaj kredos je lia nomo, kaj ne estos baptitaj en lia nomo, kaj ne persistos ĝis la fino, ili nepre estos damnitaj; ĉar Dio la Sinjoro, la Sanktulo de Izrael, diris tion.

Pro tio, li donis leĝon; kaj kie neniu leĝo estas donita, tie ne estas puno; kaj kie ne estas puno, tie ne estas kondamno; kaj kie ne estas kondamno, la korfavoroj de la Sanktulo de Izrael ampleksas ilin, pro la elaĉeto; ĉar ili saviĝas per lia potenco.

Ĉar la elaĉeto kontentigas la postulojn de lia justeco kontraŭ ĉiuj, al kiuj la leĝo ne estas donita, por ke ili estu savitaj de tiu terura monstro, la morto kaj la infero, kaj la diablo, kaj la lago fajra kaj sulfura, kiu estas senfina torturado; kaj ili redoniĝas al tiu Dio, kiu donis al ili spiron, kiu estas la Sanktulo de Izrael."



## 2 Nifai 9: 6-26

"Jen mi donis al vi mian evangelion, kaj ĉi tio estas la evangelio kiun mi donis al vi - ke mi venis en la mondon por plenumi la volon de mia Patro, ĉar mia Patro sendis min.

Kaj mia Patro sendis min por ke mi estu suprenlevita sur la kruco; kaj por ke, suprenlevita sur la kruco, mi altiru al mi ĉiujn homojn, kaj por ke, same kiel mi estis suprenlevita de homoj, tiel ankaŭ homoj estu suprenlevitaj de la Patro por stari antaŭ mi por esti juĝata pri siaj faroj, ĉu ili estas bonaj aŭ ĉu ili estas malbonaj -

Kaj por tiu celo mi estis suprenlevita; tial, per la potenco de la Patro mi altiros al mi ĉiujn homojn por ke ili estu juĝataj laŭ siaj faroj.

Kaj okazos, ke ĉiu, kiu pentos kaj baptiĝos en mia nomo, estos plenigita; kaj se li persistos ĝis la fino, jen, lin mi lasos senpuna antaŭ mia Patro en tiu tago, kiam mi staros por juĝi la mondon.

Kaj tiu, kiu ne persistos ĝis la fino, tiu sama estos dehakata kaj ĵetata en fajron, de kie oni ne povos reveni, pro la justeco de la Patro.

Kaj jen estas la vorto, kiun li donis al la homidoj. Kaj pro tio li plenumis la vortojn, kiujn li donis, kaj li ne mensogas, sed plenumas ĉiujn el siaj vortoj.

Kaj neniu malpuraĵo povos veni en lian regnon; tial nenio venos en lian ripozejon krom tiuj, kiuj lavis siajn vestojn en mia sango, pro sia fido, kaj la pento de ĉiuj siaj pekoj, kaj sia fideleco ĝis la fino.

Nun ĉi tio estas la ordono; Pentu, ĉiuj vi finoj de la tero, kaj venu al mi kaj baptiĝu en mia nomo, por ke vi estu sanktigitaj per la ricevo de la Sankta Spiriton, por ke vi staru senmakulaj antaŭ mi en la lasta tago."

## 3 Nifai 27: 13-20

(La temoj pritraktitaj de la ĉi-supra artikolo paralelas ĉapitrojn 1-3 de Gospel Principles, uzita kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.)